EAB **Update** **Ĝisdate**

www.esperanto-gb.org

An organ of the Esperanto Association of Britain
Organo de Esperanto-Asocio de Britio
No. 27, October–December 2004 ★ N-ro 27, oktobro–decembro 2004

ISSN 1741-4679

**International Communication without Discrimination ★ Human Rights in Practice**
**Internacia Komunikado sen Diskriminacio ★ Homaj Rajtoj en la Praktiko**

# Impresoj pri la 6-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

*De la 25-a ĝis la 29-a de aŭgusto okazis en Bilbao la 6-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso. Aliĝis 284 homoj el 24 landoj. Oni devas varme gratuli la organizantojn pro ege sukcesa kaj interesa evento.*

La programo inkluzivis ne nur seriozajn prelegojn kaj debatojn sed ankaŭ agrablajn ekskursojn, interalie al Gernika (la urbo aere detruita de la faŝistoj), Getxo (kun ĝia cent-jaraĝa pendoponto), kaj la fama Muzeo Guggenheim. La loĝigo estis pli ol kontentiga.

Vespere, du fratoj el Danio plezurigis nin per muziko el sia lando kaj el la keltaj landoj. Grupo da ĉarmaj polaj virinetoj prezentis publikan spektaklon sur unu el la bilbaaj placoj.

Pri tiaj spektakloj mi farus nur unu kritikon. Kiam la Universala Kongreso okazis en Zagrebo, ni ĉeestis similan prezentadon, al kiu la publiko estis invitita. Tie, kaj refoje en Bilbao, neniu krom la anonco ĉe la komenco de la spektaklo havis iun ajn rilaton al Esperanto. La teksto de la registrita muziko, kiu akompanis la dancojn estis pliparte en la uson-angla. Ŝajnas al mi, ke en ambaŭ urboj oni denove malŝparis bonan okazon por prezenti Esperanton kaj nian Esperantan aferon al la neesperantista publiko.

**'Mankas efika strategio'**
En la unua tago, post la malfermo fare de Seán Ó Riain, irlanda diplomato, la temon 'Eŭropa unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo' enkondukis Michael Cwik (Belgio). Li aludis al la politika kaj ekonomia progreso en la lastaj jaroj ene de EU, nome: la apero de komuna mono eŭro en dek du membro-ŝtatoj; la plilarĝigo ĝis dudek-kvin-membroŝtata unio; kaj la enhavo de konstitucia teksto. Plie, li menciis la originalajn motivojn por eŭropa unuiĝo, nome: la politikan – ne plu militoj en Eŭropo; la ekonomian – konservi la vivnivelon de la popoloj sur tiu kontinento; kaj la kulturan – defendi la demokration kaj la homarajn rajtojn; kaj laste li aludis al la tri grandaj defioj, kiujn EU devas alfronti jam de sia kreiĝo: la ekonomia, sociala kaj politika kohereco. Li asertis, ke ankoraŭ ne ekzistas efika strategio ene de la Esperanta movado. Tion ni nepre devas formuli.

Estas malakordo inter la teritoria kaj la demokratia principoj, kaŭze de la libera movado kaj ebleco loĝi ie ajn en la Unio. Ekzemple, en Belgio, disigita en francparolantan kaj nederlandparolantan regionojn, se granda nombro da franclingvanoj iras loĝi en nederlandlingva regiono, demokratie ili rajtas voĉdoni, ke la regiona lingvo iĝu la franca, tiel endanĝerigante la nederlandan. (Oni povus aldoni, ke simile jam okazis en gaelaj regionoj de Skotlando kaj Irlando.) La preleganto proponus, ke ne nur rajtoj, sed ankaŭ devoj estu inkluzivitaj en la nova EU-

*Kongresanoj boate ekskursas tra Bilbao*



konstitucio. Plie, laŭ la principo de subsidiareco, ne nur landoj, sed ankaŭ regionoj, kiel ekzemple tiu, kie loĝas la sorablingvanoj en Germanio, devus havi la samajn devojn kaj rajtojn kiel landoj. Eksteruloj, kiuj envenas loĝi en tiaj lokoj, devus lerni la lokan lingvon.

**Interesaj prelegoj**
Ĵaŭde estis tri valoraj prelegoj: 'Historio de la vaska laborista movado' de José Antonio del Barrio (Madrido). Rimarkinda en tiu historio estis la rolo, kiun ludis Esperanto en Eŭskio/Vaskio (kaj, oni povus aldoni, en Katalunio); 'Vidpunktoj pri EU el neunia eŭropa lando' de Antonaeta Nikolaeva, jura konsilantino (Bulgario); kaj 'Juraj aspektoj pri la pligrandiĝo de EU' de d-rino M. Rafaela Urueña Alvarez (Universitato de Valladolid).

Vendrede sekvis eble la plej gravaj prelegoj, nome: 'Kian Eŭropon ni volas aŭ bezonas?' de Michael Cwik, kun posta diskuto pri la temo 'Kiaj rajtoj kaj principoj en multkultura, ekonomie interdependa komunumo?', kaj 'Eŭropa identeco mallonge' de Zlatko Tišljar el Kroatio. Jen mallonga resumo de la lasta:

1. Homo estas socia estaĵo. 2. Homo kontentigas sian sociemon en multaj socioj (grupoj) samtempe (kiel familioj, amikaj rondoj, societoj, lokaj komunumoj, vilaĝo aŭ urbo, regiono, popolo, religio ktp). 3. Unuopulo en sia vivo aliĝas al novaj kaj forlasas malnovajn grupojn – foje pro translokiĝo, foje pro milito ktp. 4. Identecojn de forlasitaj grupoj oni ne perdas, kvankam la grado de la aparteno iom malfortiĝas. 5. El tio sekvas, ke estas normale al la jam ekzistantaj identecoj aldoni novajn, kia ekz. estas la eŭropa identeco, sed tio ne forviŝas malnovajn. 6. La ĉefa signo de identeco estas lingvo (aŭ dialekto, kiu praktike estas la sama). 7. Lingvo havas du samgravajn bazajn funkciojn: la komunikan kaj la identecan. Kiam tiuj du funkcioj konfliktas inter si, pli gravas la identeca. 8. Eŭropo nepre devas havi sencon de identeco eŭropa. Nova identeco nepre necesigas la ekziston de nova identeca lingvo. Tian identecan lingvon, kiu nepre devas esti neŭtrala kaj do nenacia, Eŭropo ne posedas. Kompreneble la identeca lingvo transprenos ankaŭ la rolon de la komunika. 9. Neŭtralan lingvon oni povas akiri en tri manieroj: (a) elektante nacian lingvon, kiu apartenas al neniu el la popoloj (ekz. Barato); (b) elektante iun el la mortaj lingvoj (ekz. Israelo); (c) elektante iun el la lingvoj, kiujn iniciatis lingvistoj aŭ iu movado (kio povus okazi per

*Daŭrigo sur la kontraŭa paĝo*



# Neŭtrala sed neniel neŭtra

Anonco de SATEB instigis min – ĉu tro kuraĝe? – al kelkaj vortoj pri la temo neŭtraleco. Neŭtraleco rilate al politikaj kaj sociaj problemoj estas fundamentaĵo de EAB kaj de UEA. Ĝi ebligas al tiuj organizaĵoj vaste agi por Esperanto, kvankam tio neniel signifas, ke la unuopaj membroj estas politike kaj socie senopiniaj.

Esperantistoj kompreneble – kaj espereble – diskutas kian ajn temon inter si libere, sed la neŭtralaj organizaĵoj mem ne povas esprimi opinion pri politikaj kaj sociaj problemoj.

Aliflanke estas komprenende, ke Esperanto mem estas fundamente revolucia socia kaj politika realaĵo, kiu proponas sin kiel partan solvon de gravaj sociaj missituacioj – kaj ni agu laŭ tio.

Por kompreni la limojn de la neŭtraleco, oni legu nur la libron *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins, kiun ĉiu esperantisto devus legi.

Geoffrey Sutton

• Material for the **next issue of *EAB Update*** should be with the editor no later than 1 December.
• Materialo por la **venonta numero de *EAB-Ĝisdate*** atingu la redaktoron plej laste la 1-an de decembro.

*EAB-Update* / *Ĝisdate* is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**
**Tel. 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372141**
**Fax / fakse: +44 (0)1782 372229**
**E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org**
**Websites / ttt-paĝoj: www.esperanto-gb.org**
**www.esperantoeducation.com**

❑ **Membership** of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter £10 / Membriĝi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto pagas £10.

✰

❑ **Material for *Update*** should be sent by e-mail, computer disk or hard copy to the editor / **Materialon por *Ĝisdate*** oni sendu rete, diske aŭ papere al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / rete: gsutton@macunlimited.net. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

❑ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto, and the English-language internet bulletin *EAB NetNews* / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto, kaj interrete la anglalingvan bultenon *EAB NetNews*.

✰

❑ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio *(Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / rete: uea@uea.org; www.uea.org)***, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

✰

❑ EAB is also affiliated to the International League of Esperanto Teachers and the European Esperanto Union / EAB estas aliĝinta ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

✰

❑ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

# La rezolucio de Bilbao

*Kunveninte okaze de la 6-a Eŭropa Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Bilbao de la 25-a ĝis la 28-a de aŭgusto 2004, la 284 partoprenantoj el 24 landoj:*

*Substrekas*, ke la homaranisma principaro de la Esperanto-movado, kaj ĝia celo al libera interkompreniĝo inter la homoj kaj la popoloj kaj al paco, tute kongruas kun la tuteŭropa volo konstrui eŭropon enpaciĝinta, unueca, harmonia kaj riĉigita de ĝiaj multspecaj kaj multlingvaj kulturoj.

*Substrekas* sian firman subtenon al la principo de strikta lingva egalrajteco kaj de neŭtrala multlingvismo.

*Notas*, en la aplikado de tiu principo, la ampleksecon de la teknikaj kaj financaj malfacilaĵoj, kiujn devas alfronti la eŭropuniaj servoj pri tradukado kaj interpretado, kaj kiujn hodiaŭ pligravigas la plivastiĝo de Eŭropa Unio.

*Konstatas*, ke en la eŭropuniaj instancoj – same kiel en multaj eŭropaj organizaĵoj, eĉ en la eŭropaj membro-ŝtatoj kaj ties instruadaj sistemoj – pli kaj pli nur unu nacia lingvo estas privilegie konsiderata kiel sola bazlingvo de komunikado kaj informado tiel malfortigante komunan eŭropan identecon.

*Konstatas*, sekve de tiu privilegio, ankaŭ la lingvan diskriminacion de multegaj dunganoncoj, kiuj proponas postenojn rezervitaj nur al denaskaj parolantoj de tiu nacia lingvo, kaj kiu tiel iom post iom kreas ties faktan hegemonion.

*Kondamnas* tiun faktan lingvan hegemonion, kiu kontraŭas ĉiujn principojn de egaleco, objektiveco kaj demokrateco, kiu maljuste favoras iun malplimulton de eŭropaj civitanoj, kaj el kiu aŭtomate fontas kultura, ekonomia, socia kaj politika superregado kaj mallojala konkurenco.

*Certas*, ke solvo de tiuj problemoj povas kuŝi en la uzo de neŭtrala lingvo kiel Esperanto, pro ĝiaj ecoj de facileco, precizeco kaj logika konstruo, de prononca homogeno kaj de rapida adapteblo, kiel traduka kaj interpreta pivotlingvo en la eŭropuniaj instancoj, kaj kiel lingvinstrua helpilo en la instruaj sistemoj de la membro-ŝtatoj.

*Proponas*, surbaze de rezolucioj de Unesko de 1954 kaj 1985 pri instruado de Esperanto, kaj de la konkludoj de la raporto 'ĝeneralaj aranĝoj pri multlingvismo', alprenita de la Eŭropa Parlamento en 2004, ke la Eŭropa Parlamento starigu interpartian grupon por funde pristudi la nunajn eŭropajn lingvajn problemojn, la diversajn ekzistantajn solvojn kaj la eblecon proponitan per Esperanto.

*Sugestas*, ke tiu prilingva grupo rapide iniciatu eksperimentojn – zorge kontrolotajn kaj mezurotajn de fakuloj kaj parlamentanoj – de uzo de Esperanto kiel traduk-interpreta pivotlingvo en la Eŭropa Parlamento, kaj ke ĝi konsilu al ĉiuj membro-ŝtatoj simile kontrolotajn eksperimentojn pri enkonduko kaj instruado de Esperanto en iliaj instrusistemoj.

*En Bilbao, la 28-an de aŭgusto 2004*

• *Aldone atingis nin ankaŭ la sekva persona kritiko de Claude Piron:* 'Krome, miaopinie, impresas malbone, ke oni parolas pri io sen kuraĝi nomi ĝin. Se oni parolas pri la angla lingvo, oni diru 'la angla', ne 'unu nacia lingvo'. Ĉar ĉiuj scias, pri kio temas, tio kredigas, ke esperantistoj timas fronte aliri la realon kaj nur kapablas aliri ĝin oblikve. Ne tiel ni igos la konsciulojn en la socio respekti nin kaj aliĝi al niaj tezoj.'

*Daŭrigo de la kontraŭa paĝo*

adopto de Esperanto). La preleganto komentis: Sen solvo de tiu problemo Eŭropa Unio disfalos okaze de la unua pli grandskala ekonomia aŭ politika krizo.

**Diskutrondo**

Sabate okazis ronda tablo pri Eŭropo. En la diskutoj, kiuj sekvis, estas kelkaj interesegaj kontribuaĵoj kaj komentoj: 'Eŭropa Unio ne ekzistas; ĝi estas kolonio de Usono'. 'Kvankam oficiale la instancoj de EU estas plurlingvaj kaj ĉiuj el la laborlingvaj havas la saman statuson; en la praktiko superregas la angla (kaj en dua rango la franca).'

Angla kongresano informis, ke la edukadaj instancoj en Anglio ne plu rigardas lernadon de fremdaj lingvoj kiel nepran studobjekton por ĉiuj lernejanoj, kaj draste reduktis fremdlingvan instruadon. Samlandano komentis, ke multaj angloj ne scias, ke ekzistas en la mondo aliaj lingvoj krom la angla; alia, ke 'por la angloj estas nur du lingvoj en la mondo: angla kaj fremda'. Jam la granda plimulto da universitataj disertacioj kaj sciencaj referaĵoj estas verkitaj en la angla. Simile okazas en aliaj eŭropaj landoj. Tiel, la sciencaj vortaroj de aliaj lingvoj ne povos evolui kaj pligrandiĝi. Ili ŝrumpos kaj malaperos. Ekonomie, kulture kaj socie, Eŭropo falas pli kaj pli sub influo kaj potenco de Usono. Iu nederlandlingvanino el Belgio, kiu estas posedanto de malgranda komerca entrepreno, diris, ke ĉiuj katalogoj, instrukcioj kaj informoj, kiujn ŝi ricevis de belgaj firmaoj pri belgaj varoj venas en la angla, ne plu en la nederlanda. Germana kongresano diris, ke en germanaj entreprenoj la dungitoj estas devigataj uzi nur la anglan lingvon, eĉ parolante inter si: germanoj kun germanoj. Kongresano, kiu vojaĝis en Pollando, diris, ke dum longa fervoja vojaĝo li aŭdis per la trajna sonsistemo nur kantojn en la angla. Similan sperton havis aliaj ĉeestantoj.

Seán Ó Riain menciis, ke en Francio 45 procentoj el la dissenditaj kantoj devas laŭleĝe esti en la franca, kiu instigas francajn komponistojn kaj kantistojn. Li aldonis, ke en iuj gaelaj regionoj en okcidenta Irlando, nur gaelparolantoj rajtas tie aĉeti domojn. Laŭŝajne la naciaj registaroj kaj EU-instancoj ne konscias pri la danĝero al siaj lingvoj. Nur neŭtrala, nenacia lingvo kiel Esperanto povas proponi solvon al tia potenciale katastrofa situacio.

**Leono kaj manĝotoj**

Seán Ó Riain resumis ĝin per du fabelaj ilustraĵoj: 1. La bestoj elektis la leonon kiel sian ĉefon. Ĝia unua ago estis deklari, ke ĉiuj bestoj estas liberaj kaj rajtas fari ĉion, kion ili deziras. Sekve de tiu deklaro, la leono formanĝis ĉiujn aliajn bestojn. 2. La angla estas bela lingvo, kiel ruĝa rozo. Sed ĝardeno, en kiu kreskas nur rozoj ruĝaj, kvankam bela, estas malpli

bela ol tiu, en kiu kreskas multaj malsamaj floroj.

Zlatko Tišljar komentis, ke ne temas pri konvinko de aliuloj pri Esperanto, sed pri tio, ke ni montru ties forton. Dum la '90-aj jaroj, Esperanto komencis agi politike, do montrante la forton de la lingvo kiel komunikilo, kiu pli valoras ol konvinko. Franco aldonis, ke ni ne sole diskutu lingvajn problemojn, sed ankaŭ, ekzemple, sociajn temojn.

**Komenco de defia tasko**

Fine de la kongreso oni proponis deklaracion. Tiu tiel nomata 'Deklaracio de Bilbao' estis aprobita de la kongresanoj kaj sendube estos publikigita en diversaj Esperantaj revuoj kaj bultenoj.

Ankaŭ la festparolanto legis malneton de plia dokumento por diskuto inter la esperantistaro. Ankaŭ tiu sugesto estis aprobita, kvankam oni konsentis, ke la dokumento bezonas pli da studado kaj redaktado.

Konklude: gravega kaj valorega evento, sed nur la komenco de defia kaj malfacila tasko por la eŭropa esperantistaro.

Garbhan MacAoidh

# Bulonjo 2005 ...

*Laŭ la paŝoj de Zamenhof – kaj do ankaŭ laŭ tiuj de 300 aliaj delegitoj ĉe la 1-a Universala Kongreso – al Folkestone kaj Dovro!*

Okazos baldaŭ post Pasko venontjara – pli precize, je merkedo la 30-a de marto 2005 – tuttaga ekskurso trans-Markola, de Bulonjo al Folkestone kaj Dovro, kaj reen. Tio okazos en la kadro de *Bulonjo 2005*, ses-taga esperantista renkontiĝo por festi la centan datrevenon de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis tie en aŭgusto 1905. Kaj dum kiu multaj kongresanoj ekskursis vaporŝipe al ... nu, ĉu necesas daŭrigi?

Aliĝintoj al *Bulonjo 2005* ricevos informilon pri tiu ekskurso, kaj povos mendi kaj porpagi ĝin komence de la renkontiĝa (longa!) semajnfino. Sed eble vi iel ne povos, aŭ eĉ ne volas, pasigi la paskan semajnfinon en Bulonjo. Ĉu vi tamen povos, malgraŭ tio, partopreni en la ekskurso 'Laŭ la paŝoj de Zamenhof'?

Jes ja! Kiam la ekskursantaj UK-anoj alvenis antaŭ preskaŭ cent jaroj en BritiOn, bonvenigis kaj akompanis ilin aliaj esperantistoj, ne nur anoj de grupoj en la

*Kvanto de la apuda afiŝo baldaŭ alvenos ĉe lokaj grupoj*




du vizitataj urboj, sed ankaŭ aliaj de lokoj pli foraj. Tiel estu ankaŭ en 2005!

Estu certa, do, ke se vi aperos tiun matenon en Folkestone vi estos inter la ekskursantoj tre bonvena, kaj povos partopreni en la planitaj eventoj: gvidata promeno ĉirkaŭ Folkestone, kun Esperanto-parolanta ĉicerono; renkonto kun la Urbestro de Folkestone, kiu alparolos la vizitantojn kaj bonvenigos ilin; kune tagmanĝi, kompreneble tamen je propra kosto, en restoracio apud Dover; laŭvole (kaj proprakoste!) viziti kun ili Kastelon Dovran; kaj esti gasto, laŭinvite de Esperanto-Asocio de Britio, ĉe fruvespera Akcepto en Folkestone. (Vojaĝadon inter tiuj eventoj vi devos mem aranĝi, ĉar la aŭtobusoj el Francio rajtas akcepti kiel pasaĝerojn nur tiujn, kiuj posedas validan bileton, aĉeteblan nur en Bulonjo.)

Pli detala horaro, kun priskribo de la menciitaj eventoj kaj vizitoj, aperos en estontaj numeroj de ĉi tiu kaj eventuale de aliaj britaj esperantistaj gazetoj kaj bultenoj. Senpaciencaj legantoj povus intertempe kontakti la organizanton, Terry Page (tel. 01908 564004, rete: terry-page@supanet.com). ❏

**Aliĝu baldaŭ**, ĉar la unua limdato estas la 30-a de novembro, dum la dua estos kiam aliĝoj sumiĝos je 500 – kio kredeble okazos antaŭ la fino de la jaro! Aliĝo kostas £53 ĝis la 30-a de nov. kaj £60 poste. Vidu la ttt-paĝojn ĉe www.boulogne2005.com (kie aliĝilo elŝuteblas) aŭ **tuj petu aliĝilon** de la Oficejo de EAB (adreso sur p.2) tel. 0845 230 1887. Krom la aliĝilo, oni bv. atenti plenigon de loĝrezervilo kaj mendilo por ekskursoj.



# Lernojaro 2004-05

*Jen denove kuraĝiga mesaĝo el Benino. Eble iu brita Esperanto-grupo ŝatus kunhelpi prizorgi afrikajn lernantojn de Esperanto?*

En Benino okazas ĉiun jaron lerneja premio-tago – kaj entrudiĝas Esperanto. Tradicie oni fine de ĉiu lernojaro disdonas premiojn al lernantoj. La premioj konsistas el ĉiuspecaj donacoj senditaj de esperantistoj el Aŭstralio, Eŭropo, Usono... Denove tiun ĉi lernojaron okazis la premio-tago en la lernejo Aguidahoue, fora vilaĝo de Lokossa. Modestaj estas la premioj sed ĝojigaj.

**Projekto Interkulturo**

La 31an de julio, hieraŭon de benina sendependa festotago, okazis la premio-tago, en kiu agadas Esperanto-Projekto Interkulturo (EPI). Multaj lernantoj ricevis belan krajonon, skribilon, bildkarton, skrapgumon, paŝtelon aŭ poŝkalendaron. Al-

done, iuj lernantoj ricevis konforme al la klasrezulto etajn kaŭĉukajn pilketojn, vestaĵojn, notfoliarojn, poŝhorloĝojn, monujojn, liniilojn, pupojn. Kajerojn oni donacas aparte al la lernantoj, kiuj sukcese trapasis la lernejan finekzamenon por atingi la kolegion. Daŭre menciindas la senĉesa sendado de gazetoj kaj libretoj el Francio. Tio ebligas al EPI starigi egan bibliotekon por la lernantoj en la lernejo.

**Kaj en dua lernejo**
Malgraŭ la ĉi-jare nesufiĉaj donacoj, EPI kontribuis ankaŭ al la venonta premio-tago en la lernejo Jules Verstraeten de Koĝi, disponigante al la tieaj lernantoj kajerojn, skribilojn, krajonojn, gazetojn kaj skrapgumojn. Korektiloj, insignoj kaj sakoj (senditaj de Jean-Yves Santerre kaj Hans Bakker) estis donacitaj al la instruistoj, kiuj partoprenis la okazintan seminarion de EPI en la lernejo Aguidahoue (http://esperanto-vorpommern.de).

**Helpu lernejan turniron!**
Pro la tre bela trofeo, disponigita de Agnes Geelen el Belgio, oni organizas turniron inter la lernejoj Aguidahoue-Koĝi kaj Adame. Ĝi okazos en oktobro. La venkinto gajnos la trofeon. Ni insiste petas helpon de aliaj por bone preparadi ĉi tiun turniron.

La premio-tagon ĉeestas la Esperanto-instruisto Houenavo Pierre de lernejo Jules Verstraeten de Koĝi kaj du aktivaj esperantistoj de la grupo 'Egaleco'.

Laŭdon kaj dankon al ĉiuj gesamideanoj, kiuj pensis pri la lernantoj de EPI, sendante donacojn por instigi ilin utiligi la lingvon.

Ni kaptas la okazon por atentigi ĉiujn bonvolemulojn, ke la donaco-mono povas atingi EPI per la UEA-konto 'hufs-j', kio evitas eventualajn perdojn ĉe la poŝto.

Por pliaj informoj kaj subteno, bonvolu direkti vin al: François Hounsounou, BP 226 Lokossa-Mono, Benino; ttt-paĝoj: www.iespana.es/Esperanto_es/benino. ❑

# Esperanto nun en Afganio

La 23–an de septembro ĉe Universitato de Kabulo, Afganio, naskiĝis nova Esperanto-organizaĵo. Temas pri Afgana Amika Asocio de Esperanto-Movado. Ĉeestis la fondan kunvenon la Universitata Prezidanto, la Dekano de la Fakultato pri Belartoj kaj ducent gestudentoj. Ĝis la unua afgania Esperanto-renkontiĝo la provizora prezidanto estas s-ro Kampo. La tuja celo de la fondintoj estas post komputilaj kaj KD-kursoj partopreni en la Universala Kongreso en Japanio, en 2007. La nova asocio intime kunlaboras kun Japana Amika Asocio de Esperanto 'Magio'.

EAB sendis gratulojn kaj bondezirojn kun propono kunlabori. Viajn proprajn salutojn kaj kuraĝigojn sendu al: Afgana Amika Asocio de Esperanto-Movado. Poŝte: Fakultato pri Agrikulturo – S-ro Mojtaba Mousavi, Dormitory for Men wingB 2floor no.90, Universitato de Kabul, Afganio. Rete: aaadem_kabul@yahoo.com. Ttt-ejo: www2u.biglobe.ne.jp/~fukuto/aaadem/aaadem.htm.



*Novaj afganaj esperantistoj-studentoj ĉe Universitato de Kabulo*

## EAB en Pekino

Paŭlo Gubbins oficiale reprezentis EAB ĉe la Universala Kongreso en Pekino. Li partoprenis du sesiojn de la Komitato de UEA.

Oni krome petis, ke li respondecu pri la Subkomitato pri Edukado. Li do prezidis publikan dumkongresan kunsidon pri edukado kaj preparis skriban raporton, prezentitan al la vendreda sesio de Komitato A. Raporto pri tio baldaŭ legeblas en la revuo *Esperanto*, la oficiala organo de UEA.

S-ino Ulla Luin, la nova ĝenerala sekretario, petis, ke Paŭlo aliĝu al elektronika subkomitata diskutlisto pri edukado.

Krome, komence de la UK, Paŭlo salutis kongresanojn nome de EAB (kaj raportis, ke ekzistas filma versio por montri al sekvaj generacioj, kiamaniere inde kaj bontone saluti!).

Kromkrome, ĉi-foje sen EAB-ĉapelo, li kunrespondecis kun prof. Humphrey Tonkin pri la kongresa temo kaj kunpreparis la kongresan rezolucion.

'Tre plaĉa kaj sukcesa kongreso', komentis Paŭlo cetere.

# Barlaston Summer School 2004

At the 44th Esperanto Summer School in Barlaston (7–13 August) it rained. It rained a lot. It rained so much that the roads became rivers and the planned walk in the Churnet Valley was cancelled because of a shortage of lifeguards.

**Total immerson**
Happily, in the Summer School itself a pleasanter kind of immersion was taking place: an immersion in language. Here were the *progresantoj*, paddling at first, then finding they could float and trying braver strokes. Over at the deep end were the *progresintoj*, confident, of course, but honing their technique and style. And all under the watchful eyes of the instructors, who taught, monitored and encouraged, and found a *progresinto* to swim alongside each *progresanto*.

**Demanding, but rewarding**
It was a demanding but infinitely rewarding week. From breakfast to closing-time in the village pub, it was Esperanto all the way. The lessons covered grammar and pronunciation in a variety of ways: listening to speeches and songs, reading texts and poems, translating into and out of Esperanto, chanting on the lawn. The emphasis was on active use of the language, working individually, in pairs and in groups.

**Culture to culture**
In the evenings, there was a choice between lectures and language games. I listened enthralled to Ionel Oneţ, the visiting tutor, as he talked about Romania and the ‘real’ Dracula. Here was the international language at its best, communicating one culture to another with insight and humour. David Kelso, master of accent and gesture, gave an entertaining account of his two homes, Calabria and Caledonia. And the final evening found us all on the stage in one way or another, with performances ranging from ‘There’s a hole in my bucket’ to ‘Shall I compare thee to a summer’s day?’ (not this week perhaps).



*Visiting tutor, Ionel Oneţ – with a bottle of something red.*
Below: *The participants in this year’s Barlaston Summer School*

**Sheer dedication**
But what impressed me most was the sheer dedication of those on the course. It is one thing to take part in structured lessons but quite another to persevere with the language throughout meals and in the pub at the end of a long day. There you could hear people swapping life stories, telling jokes and solving the world’s problems – all the while helping each other to find *la ĝustan vorton*. This is about enthusiasm and confidence and for that we have to thank our three hardworking tutors – Paul Gubbins and Angela Tellier of EAB and Ionel Oneţ from the UEA office in Rotterdam – whose patience and encouragement underpinned our progress, and whose perfect Esperanto was an inspiration to us all.



The demanding programme still allowed time to visit the Butler Library and EAB bookshop (where many bargains were to be found on the secondhand shelves), and in between showers the garden and grounds of Wedgwood Memorial College beckoned – essential exercise after a cooked breakfast and two three-course meals a day!

Next year’s Summer School is scheduled for 6–12 August. Whether it rains or not, total immersion is guaranteed.

David Lilley

# Educational activities

*Here are highlights from the recent Internal Education Report by Angela Tellier (24 September 2004), on EAB's educational activities.*

The new correspondence course leaflet has been quite successful in bringing in orders, such that the stock has run out. The previous version is now being updated and restyled.

The new full-colour wrapper for the Free Correspondence Course has been updated and restyled and is ready for press.

The tutor's resource book for the *Elementary …!* course has been updated and will be sent out with the next 'Education' bulletin to all current tutors.

The new Advanced Course is to be based on Boris Kolker's *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, with EAB acting as agent.

A new Translation Course is proposed, based on William Auld's *Paŝoj al Plena Posedo*, to consist of extracts from all thirty lessons, tutor-supported, and both Esperanto–English and English–Esperanto. A tutor reference book of texts is to be supplied. This is to fill a gap in the new 'Advanced Course', as EAB's exams still require translation, and to provide a more extensive course for those – and there are many – interested in translating. It is proposed to reprint a booklet of translation texts from *La Brita Esperantisto* to accompany the course as a self-help resource.

**Residential courses**
There is to be a three-tier Summer School next year to include a course on culture/history research, using the Butler Library.

'Course-you-can … speak Esperanto' will run as usual in October.

The proposal for a Taster Day at Wedgwood Memorial College, Barlaston, that was originally suggested by the college principal is in the process of being finalised. It will be free to local participants and be no expense to EAB. Terry Page has volunteered to present the sessions. (See p.12.)

**New publications**
Preparation of Don Lord's *Ĉiutaga Esperanto* is progressing well.

EAB's revision and reprinting of *Mil Unuaj Vortoj en Esperanto* (see p.9) was presented at the conference of ILEI – the Esperanto teachers' organisation, to which EAB is affiliated.

**Learning resources**
The original draft of Bessacarr's *Look at Esperanto* was deemed inappropriate, and was being rewritten, ready prior to the London Language Show.

**Verdaj Voĉoj – now available**
This new EAB computer disk, compiled by Paul Gubbins, is the first interactive CD-rom and is now ready and on sale at £8.05 incl. p.&p. from the EAB Office.

The disk contains eight graded texts by nine nationalities on various subjects (below). ❑




## Second-hand books for sale from the EAB office (September 2004)

This is just a sample of the good current stock. Prices include post & packing. SB = softback/paperback, HB = hardback. There is one copy only of some of these books, so please contact the office (tel. 0845 230 1887) to ensure availability before ordering.

*Cezaro* de Marko [Mirko] Jelužić. El la germana kaj kroata Ivo Rokvić. Budapeŝto:1934. Romano; fama 'fajroŝpruĉa' traduko; 533p., HB. £3.75
*La Dormanto Vekiĝas* de H.G.Wells. El la angla A.F. Millward. Londono: 1929. Romano; 210p., HB. £2.75
*Junaĝa Verkaro* de Edmond Privat. La Laguna: Stafeto, 1960. Noveloj, dramoj, poemoj; 143p., SB. £2.85
*Kara Diablino* de Douglas P. Boatman. La Laguna: Stafeto, 1979. Originala Esperanto-romano; 110p., SB. £2.20
*Kiel Kovi* Pekino: 1983. Kolora bildlibro por infanoj, 26p., SB. £0.75
*La Mizeruloj* (parto1) de Victor Hugo. El la franca Centezimala. Nederlando: 1914; 248p., HB, sufiĉe bona stato. £3.20
*La Nekonata Konato* de Douglas P Boatman. Kopenhago: 1977. Mistera romano; 120p., SB. £1.00
*Rakontoj pri Fantom-Spitantoj*. Ĉinio: 1961. 30 rakontoj; 98p., SB, en bona stato. £1.80
*Rando de la Prudento* Miroslav Krleĵa. El la kroata. Zagrebo: 1987. Romano; 240p., HB, bona stato. £3.30
*La Sentimulo* de J.F. Cooper kaj R. Imbert. Zagrebo: 1984. Romano uzanta nur 450 bazajn vortojn; 70p., SB. £1.10
*Sklavoj de Dio* de Geza Gardonyi. El la hungara Johano Hamvai. Hungario: Hungara klasika romano; 409p. SB. £3.30
*Slovaka Antologio*. El la slovaka. Bratislavo: 1977 kaj '80. Noveloj, drametoj, poemoj; 526p. HB. £5.50
*Sveda Novelaro*. El la sveda. Stokholmo: SAT, 1950. Dudek diversaj noveloj de diversaj verkistoj; 235p., SB. £2.80
*Tra Dezerto kaj Praarbaro* de H. Sienkiewicz trad. M. Sygnarski. Varsovio: 1978, Romano; 315p SB. £4.30
*Virino ĉe la Landlimo* de Marjorie Boulton. Kopenhago:1959. Kolekto de drametoj kaj skeĉoj; 196p., HB. £4.30

# SATEB en Barlastono

Sian jarkunvenon SATEB okazigis en Barlastono de la 14-a ĝis la 16-a de majo. Venis dudek naŭ homoj. Partoprenis vizitantoj el Belgio, Francio, la Ĉeĥa Respubliko, Litovio kaj Barato. Deĵoris en Biblioteko Butler la tutan semajnfinon Geoffrey King, kun helpo de Jean kaj David Bisset.

La programo por la semajnfino inkluzivis prelegojn de du eksterlandaj gastoj, Distran Vesperon, Diskutgrupon kaj Lingvoklinikon (Petro Miles) kaj Konversaciajn Grupojn (Alwyn Kind kaj Katarina Tustin).

La sekretario de SAT, Kresimir Barkoviĉ, parolis pri '7,000 Tagoj en Siberio', kiun li tradukis tiel bele, ke li ricevis la Osiek-premion. Temis pri serioza prelego pri la vivo en gulagoj dum la '30aj jaroj en Sovetunio.

**Kasko apud la lito**

Lia dua prelego temis pri lia vizito al Japanio. Li ridegis nin parolante pri tieaj aŭtomataj necesejoj endome. Alia stranga afero por li estis trovi kaskon apud lia lito – tie pro la multaj tertremoj.

Pedro Chrdle (el la Ĉeĥa Respubliko) montris bildojn pri la venonta SAT -kongreso, kiu okazos en Bratislavo, Slovakio. Poste li parolis pri la eniro de sia lando en la Eŭropan Union.

Por la Distra Vespero, krom la multaj ŝercoj kaj rakontoj, Perlo Simons kantis sola, kaj Vilĉjo Simcock ludis piane ĵaz-peceton kaj akompanis nin dum kunkantado.

Ron Lynn enkondukis la temon de la Politika Diskutgrupo 'Tergloba Varmiĝo'. Li klarigis, ke kvankam Usono rifuzis subskribi la Kiotan Interkonsenton, grava estos la decido de Rusio, kiu ankoraŭ ne decidis.

**Nova prezidanto**

Post dek jaroj kiel prezidanto, Perlo eksiĝis, kaj Vilĉjo Simcock volontulis anstataŭi ŝin. Anne Johnson anoncis, ke ankaŭ ŝi volas eksiĝi kiel sekretario, sed neniu proponis anstataŭi ŝin, do ŝi konsentis resti – sed nur unu jaron. Perlo restas komitatano.

Finfine SATEB denove havas redaktoron por *La Verda Proleto* – Roberto Blow.

Do, SATEB fiera restas sur la Esperanta scenejo, kaj ni esperas, ke niaj estontaj semajnfinoj daŭre estos internaciaj, viglaj kaj sukcesaj.

Nia venonta semajnfino okazos de la 13-a ĝis la 15-a de majo 2005, denove en Barlastono. Mendu frue.

Anne Johnson, sekretariino

## De SATEB al ĉiuj esperantistoj

EAB kaj UEA estas ĝuste neŭtralaj, sed se esperantistoj volas diskuti ian ajn temon, la komitato de SATEB kore invitas vin partopreni semajnfinan konferencon venontan jaron.

SATEB signifas 'Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio'. Tiu strebas disvastigi kaj instrui la internacian lingvon; ankaŭ disvastigi la ideojn kaj principojn de SAT.

SAT estas mond-organizaĵo. La membroj amike diskutas ian ajn temon – inkluzive de politikaj kaj religiaj aferoj. Tamen, laŭ statuto, SAT ne estas partipolitika; membroj apartenas al diversaj progresemaj movadoj kaj laboristaj partioj el la tuta mondo.

Eugene Adam, kiu uzis la plumnomon Lanti, estis pensanto kiu ĉiam strebis pensi objektive kaj honeste. Iujn teroraĵojn de la Unua Mond-Milito li sciis pro sia propra sperto en ambulanca taĉmento. Naciismo estas politika doktrino, laŭ kiu la nacia tradicio estas ĉiam prava kontraŭ tiuj de iu ajn alia. La sperto de Lanti pli intensigis lian abomenon al naciismo. Ĝismedola Esperantisto, ekde 1920 li pledadis por 'sennacieca' organizaĵo.

SAT (kaj SATEB) rilatas al edukado kaj kulturo, kiuj instigas membrojn kompreni kaj toleri diversajn politikajn, filozofajn, kaj ekonomiajn skolojn, kaj pensi tutmonde kaj sennaciisme. SAT ankaŭ akceptas kaj subtenas la principojn de demokratio. Tiel, per komparado de faktoj kaj ideoj, la organizaĵo provas helpi membrojn eviti dogmeman pensadon kaj, super ĉio, forigi ŝovinisman naciismon kaj ian ajn ksenofobion, kaj tiel fariĝi veraj mond-civitanoj.

Do, bonvolu noti en via taglibro: *SATEB-Semajnfino*, 13-a–15-a de majo, 2005; Wedgwood Memorial College.

Nia gast-preleganto estos Atilio Orellana Rojos. Li estas diplomita kiel filologo pri klasikaj lingvoj ĉe la Nacia Universitato de Cordoba. Li ankaŭ estis instruisto de la rusa lingvo ĉe la Domo de Amikeco Argentino-Soveta. Esperanton li instruis en jam pli ol 60 landoj. Nuntempe li estas direktoro de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

Mendu lokon frue!

W.H. Simcock, Prezidanto, SATEB

## Hark!

**As the Management Committee and members know, publicity is paramount, so EAB's Publicity Subcommittee is always searching for new ideas – or any golden oldies. Why not arrange a brain-storming session at the local group? All good ideas – and offers of help – to Helen Fantom (chair of the Publicity Subcommittee) tel. 01635 38592 or e-mail helen@mintex.demon.co.uk, or to Jim Voiels (Information Co-ordinator) at jim@voiels.fsnet.co.uk.**

# 'Ankaŭ belega paroliga libro por plenkreskuloj'

• ***Mil unuaj vortoj en Esperanto.*** Barlaston: Esperanto-Asocio de Britio, 2004. ISBN 0-902756-21-4. Reviziis Edmund Grimley Evans.

Bonkvalitaj, profesinivele eldonitaj Esperanto-lerniloj bedaŭrinde tre malabundas. Des pli da atento meritas la nova eldono de la kolora bildvortaro *Mil unuaj vortoj en Esperanto*. Ĝia ĉefa celgrupo estas infanoj de ĉiu ajn aĝo – sed ĝi estas ankaŭ belega paroliga libro por plenkreskuloj. Jam ofte kaj kun bona sukceso mi uzis la libron (precipe la paĝojn pri bestoj, familio, manĝajoj, sporto, la vetero kaj la sezonoj) en Esperanto-kursoj en Germanio aŭ kadre de internaciaj aranĝoj.

Kompare kun la unua Esperanta eldono, aperinta verŝajne en 1994 kun desegnaĵoj de 1979, la nova versio havas abundon da plibonigoj. Multaj paĝoj estas tute nove pentritaj; kaj ĉie – kaj en la bildoj kaj ĉe la esperantaj vortoj – oni trovas aktualigojn kaj plibonigojn.

Multo aspektas pli moderna; nove aperis ekzemple 'komputilo' kaj 'KD', dum 'skribmaŝino' ne plu troveblas en la libro.

La 'argano' nun nomiĝas 'gruo'; la 'lumbriko' simple 'vermo'; el 'agariko' fariĝis 'fungo'; la 'lesivo' nun estas 'lavpulvoro'; 'pampelmo' iĝis 'pampelmuso', anstataŭ 'kolubron' ni nun trovas 'serpenton'. Aliflanke, oni anstataŭigis 'plastron' per 'pansaĵo', vorto antaŭe ne konata al mi. La solan tajperaron mi trovis en la indekso, p.63: 'unucicklisto'!

**'Esperanto lernen'**

Lastatempe nia dujara filineto Christina plurfoje kun ĝojo alportis al mi la libron, dirante al mi germanlingve 'Esperanto lernen!', kaj tiam mi ĉiam konsciiĝis pri tio, ke *Mil unuaj vortoj* vere estas trezoro – nome la plej bela Esperanto-lernilo, kaj samtempe unu el la plej utilaj.




---

**UK prices (all incl. p&p):**
1 copy £9.20
3 copies £18.40
20 copies £115.00.
(Overseas orders are with p&p at cost.) For further information tel. 0845 230 1887. ❑

## MALLONGE

**• Historia datreveno**

La 14-an de oktobro 1904 esperantistoj fondis Britan Esperantistan Asocion, kun kompaninumero 93189. Oni fondis EAB kiel la sekvanton de BEA, kiam oni opiniis pli konvene havi bonfaran asocion anstataŭ kompanion.

Prepare por la centjariĝo, Jim Voiels elsendis pakaĵon al ĉiuj lokaj grupoj. Ĝiaj inform-materialoj inkluzivas: 'International language takes off in Britain', 'Events leading up to the creation of Esperanto Association of Britain', 'Connect to our global network / An international language' and 'Esperanto correspondence courses'. Por pliaj informoj kontaktu: Jim Voiels. Tel. 01704 226776; rete: jim@voiels.fsnet.co.uk

Aldone, d-ro Marjorie Boulton prelegis pri la centjariĝo matene de la 9-a de oktobro en Londono, kaj prof. John Wells prelegis la antaŭan vesperon ĉe la Londona Esperanto-Klubo.

**• Updated booklist**

EAB's booklist has just been updated again. To receive a copy send a stamped addressed envelope to the EAB office (see p.2).

**• Gratulon, Paŭlo!**

Informis nin aŭskultinto al la Esperanta Servo de Radio Pollando je la 29-a de julio, ke ĉe la Universala Kongreso en Pekino gajnis ĉiujn tri premiojn en la kategorio 'Teatraĵoj' Paŭlo Gubbins pro la verkoj 1. *Heksaklоro unu komo tri*, 2. *Fina movimento*, kaj 3. *Pacaj batalantoj.* Paŭlo ĉiujare organizas la teatran semajnfinon 'Ni Festivalu' en januaro en Barlastono. Kial ne lerni kaj kunludi kun la majstro?

**• EAB to Whitby in 2006?**

The Management Committee of EAB have received a proposal from the Yorkshire and Humberside Federation that the British Esperanto Congress in 2006 take place in Whitby. Although no official decision was made by the time of going to press, it is expected we shall be convening in Yorkshire in spring 2006.

**Bonvolu noti!**

# Nova Peranto de UEA por 2005

## *nun vi povas pagi membrecojn por EAB kaj UEA kune*

Kerna servo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas organizi la ĉiujaran Universalan Kongreson de Esperanto (UK) tra la mondo, je kies kotizo individua membro ricevas rabaton. UEA funkciigas ankaŭ la plej grandan libroservon de Esperantaj libroj (pli ol 4 000 diversaj libroj kaj varoj), pri kiu haveblas 190-paĝa presita katalogo kaj ttt-paĝo (www.uea.org/katalogo).

Por pli detalaj informoj pri la organizo kaj rolo de UEA, oni konsultu ĉi ties Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*.

**Fariĝu individua membro de UEA**
Eblas pagi por individua membreco rekte al UEA per kreditkarto (Visa, Eurocard, Mastercard, Access aŭ American Express), al nederlanda poŝtĝira konto 37 89 64 (Den Haag) aŭ al la banko Bank Mees Pierson, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam, Nederlando (konto 25.52.89.804).

Alternative, oni povas pagi al la **brita Peranto de UEA**, kiu akceptas britan ĉekon aŭ poŝtmandaton kondiĉe ke ĉi tiu estas skribita al 'EAB', kio ebligas pagi ankaŭ kotizon al EAB samtempe: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0870 230 1887; retadreso: eab@esperanto-gb.org. Oni ne sendu britan ĉekon rekte al UEA.

En la okazo se vi estas **nova membro**, bonvolu doni viajn plenajn nomon, adreson kaj, se vi havas **29 aŭ malpli da jaroj**, ankaŭ vian naskiĝjaron*. Ĉiuokaze bonvolu klare indiki la celon de la pago. Por aniĝi oni ne postulas plenigon de oficiala formularo.

### *Kotizoj de UEA por 2005*

**MG**/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado ............................ £6
**MJ(-T*)**/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago) ................................................ £15
**MA(-T*)**/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto* ........................................................................................ £37
**DM(-T*)**/Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA ... ........................................................................ £925
**DMJ(-T*)**/Dumviva Membro kun Jarlibro .......................................... £375
**SA**/Simpla abonanto al la revuo *Esperanto* sen membreco … ............ £23
**Kto**/Abono al la revuo *Kontakto* sen membreco ................................. £14
**SZ**/Societo Zamenhof: mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon ........................................................................................ £74

**Kongres-aliĝoj kaj aliaj pagoj**
La Peranto povas akcepti pagojn (kvankam ne per kreditkarto) ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA, por kiuj celoj la administrejo de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. La Peranto kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK, sed ne pri librokatalogoj.

☆ **Universala Esperanto-Asocio**
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Tel. 00-31-10-436-1044; Fakse 00-31-10-436-1751; Rete uea@co.uea.org; sekretario@co.uea.org; financoj@co.uea.org; kongresoj@co.uea.org; uk.mendoj@co.uea.org; libroservo@co.uea.org; TTT-paĝo: www.uea.org

## MALLONGE

**• Nova grupo serĉas kontaktojn**
Antaŭ nelonge fondiĝis nova Esperanto-grupo en Japanio. Ĝi serĉas kontaktojn en eksterlando: Esperanto-Grupo de Ariake, Ryuganizyi 464, JP-865-0061 Tamana-si, Kumamoto-ken, Japanio.

**• Alico furoras**
La eldonejo Sezonoj ĵus reeldonis la libron *Alico en Mirlando* de Lewis Carroll. La unua eldono de la Esperanta traduko de Donald Broadribb elĉerpiĝis dum malpli ol unu jaro! La dua eldono haveblas kontraŭ 7,00 eŭroj de: Sezonoj, Ab. Ja. 1248, RU-236039 Kaliningrad, Ruslando; rete: sezonoj@gazinter.net; www.esperanto.org/ondo/; tel. 0112 656033. Se vi deziras, ili sendos al vi sian plenan libroliston.

**• Tuta landa kongreso televide**
Laŭdire la unuan fojon en la historio oni televidigis tutan kongreson de Esperanto pere de la interreto. Temis pri la Brazila Kongreso en Macejoo, okazinta de la 19-a ĝis la 22-a de julio. Informis Emilio Cid (Voĉa Babilejo, www.esperantointernacia.hpg.com.br).

**• *Ĉeriza ĝardeno* en Esperanto okaze de la centa mortodato de Anton Ĉeĥov**
Ekde 2000 la eldonejo Sezonoj ĉiujare eldonas ampleksan libron el la rusa klasika literaturo: *Resurekto* de Tolstoj (2000), *Malvivaj animoj* de Gogol (2001), *Blankaj noktoj* de Dostojevskij (2002) kaj *Rusa novelaro: la 19a jarcento* (2003).




Ĉi-jare aperis – okaze de la centa mortodato de Anton Ĉeĥov – jubilea kolekto de Ĉeĥov *Ĉeriza ĝardeno*. Ĝi enhavas tridek ses rakontojn,

novelojn kaj dramojn, inter kiuj estas la jam klasikiĝintaj 'Sveda alumeto', 'Dika kaj magra', 'Ĥameleono', 'Ĉevala familinomo', 'Ivaĉjo', 'Enua historio', 'La homo en ujo', 'La damo kun hundeto', 'Urso' kaj la titola dramo 'Ĉeriza ĝardeno'.

La tekstojn tradukis Aleksander Korĵenkov, Aleksej Birjulin, Viktor Kudrjavcev, Valentin Melnikov kaj aliaj elstaraj ruslandaj tradukantoj. Ilin kontrollegis sep okcident-eŭropaj kompetentuloj.

La 352-paĝa libro mendeblas ĉe la Libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroservo kontraŭ €27.

**• Prilingva prismo**

La 'septembra temo' de *Lingva Prismo* (www.lingvo.info) estis 'Ĉu ortografiaj reformoj estas senchavaj? pro la reformo de la germana ortografio, konsentita inter la germanlingvaj ŝtatoj en 1996 kaj efika en 1998. Ekde sia enkonduko ĝi kaŭzis multan polemikon. Post periodo de transiro la reformo plene efektiviĝos en 2005. Sed, malgraŭ la amasa simpligado de la ortografio, la ĝenerala publiko, la eldonejoj kaj diversaj politikistoj protestadas kontraŭ la reformo ĝis preskaŭa inversigo. Informis Cornelia Blome, redaktorino, Hesselbom Berlin GmbH, Stralauer Platz 34, DE-10243 Berlin, Germanio; rete: cornelia@lingvo.info.

**• Shakespeare translation in *The Times***

The 'Weekend Review' of *The Times* on 10 July, included some of Shakespeare's *Hamlet* in Esperanto: *Ĉu esti aŭ ne esti, – tiel staras | Nun la demando: …* Unfortunately, it carried several errors. Jim Voiels replied with the correct version, with help from Edmund Grimley Evans. (The editor has not had the opportunity to check which translation it was, by Zamenhof or Newell.)

**• BBC Merseyside interview**

Ian MacDowell was recently interviewed about Esperanto by Clare Hamilton on BBC Radio Merseyside under the heading 'Unusual Hobbies'.

**• Help UEA with your used postage stamps**

Even your most boring postage stamps have a value. UEA collects them from all over the world and sells them by the kilo to a collector. Stamps from home or abroad should be cut from the envelope with a centimetre or two of surround – not unstuck from the envelope. A few thousand euros is raised by this means

## *Free tickets with this issue!*

Enclosed are free tickets to the London Language Show. Don't forget to visit it at Olympia from 5 to 7 November (10.00–18.00; Sunday 10.00–17.00). EAB's stand is No.70. Helpers still welcome (contact Helen Fantom. Tel. 01635 38592).

# Librovendoj

Jen koncizigita statistiko el la oficejo de EAB pri la libroj, kasedoj, diskoj ks. venditaj dum la pasintaj tri jaroj. Enestas sole libroj, da kiuj vendiĝis pli ol dek ekzempleroj. Ĝi montras la konatan fenomenon, ke vendiĝas ĉefe lerniloj kaj vortaroj.

• Kaj jen ideo por la loka klubo! Kial ne aĉeti iom pli defian libron el la *Librolisto de EAB* (aŭ el la multe pli ampleksa *Esperanto-Katalogo* de la Libroservo de UEA) – ekzemple originalan beletran – kaj legi, studi kaj diskuti ĝin en la klubo?

| Titolo | Aŭtoro | Vendoj dum la pasintaj 3 jaroj |
|---|---|---|
| *Asteriks kaj la Normanoj* | Goscinny | 10 |
| *English–Esperanto Dictionary* | Peter Benson | 10 |
| *Gerda malaperis! Vortlisto* | Claude Piron | 11 |
| *Paŝoj al plena posedo* | William Auld | 12 |
| *Pocket Esperanto Dictionary* | A. McLinen | 12 |
| *Gerda malaperis!* | C. Piron | 13 |
| *Legolibreto* | | 13 |
| *Reveno de la reĝo, La* | J.R.R. Tolkien | 13 |
| *Being Colloquial in Esperanto* | Jordan | 14 |
| *Lasu min paroli plu!* | Claude Piron | 14 |
| *Imagu!* (kasedo) | John Douglas | 16 |
| *Secondary School Esperanto 1* | R.Markarian/J.Sullivan | 17 |
| *Rakontoj el pluraj landoj* | F. Parker | 18 |
| *Himnaro Esperanta* | M.C. Butler (comp.) | 19 |
| *Teach Yourself Esperanto* | Cresswell/Hartley/Sullivan | 19 |
| *Plena ilustrita vortaro de Esperanto* | Waringhien/Duc Goninaz | 22 |
| *Londono kantas* | | 27 |
| *Liza kaj Paŭlo* (kasedo) | R. Rossetti | 29 |
| *Leteroj el Svedio* | Harold Brown | 35 |
| *Esperanta rimvortaro* | Jonathan Cooley | 39 |
| *Internacia kuirlibro* | J. Shorter-Eyck | 42 |
| *Jen Londono!* | J. Lewesdon | 48 |
| *Junaj trezor-serĉantoj, La* | J.H. Sullivan | 56 |
| *English–Esperanto Dictionary* | F.Fulcher/B.Long | 59 |
| *Zamenhof – Creator of Esperanto* | Marjorie Boulton | 62 |
| *Jen nia mondo 2* (kasedo) | J.C. Wells | 64 |
| *Liza kaj Paŭlo* (libreto) | R. Rossetti | 64 |
| *English–Esperanto Dictionary* | F. Fulcher/B. Long | 75 |
| *Jen nia mondo 2* (lernolibro) | Dr. J.C. Wells | 84 |
| *CD Pronunciation* (kompaktdisko) | | 87 |
| *Jen nia mondo 1* (kasedo) | Bartoŝik/Schilperoord/Wells | 94 |
| *Esperanto–English Dictionary* | M.C. Butler | 123 |
| *Esperanto, the International Language* | W.J. Downes | 137 |
| *Jen nia mondo 1* (lernolibro) | J.C. Wells | 146 |
| *Teach Yourself Esperanto Dictionary* | J.C. Wells | 147 |
| *Esperanto Teacher, The* | M. Stuttard | 149 |
| *Mil Unuaj Vortoj en Esperanto* | Heather Amery | 172 |
| *Teach Yourself Esperanto* (1987) | Cresswell/Hartley/Sullivan | 281 |

every year for the *Fondaĵo Canuto*, which helps Esperantists in poor countries to join UEA and read the review *Esperanto*. If you'd like to help, please send your collections to: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Netherlands. *Koran dankon de esperantistoj en pli malriĉaj landoj!*

**• Norwich Jubilee Esperanto Foundation**
NoJEF has applied to the Charity Commission to amend its regulations to legalise grants from the W.F. Edwards Fund to young British people attending Esperantist venues in Britain. If anyone wishes to see the draft scheme and make comments, it is available at Esperanto House (see p.2) or from the Secretary of NoJEF, Kate Hall, 37 Granville Court, Oxford OX3 0HS. Tel. 01865 245509.

**• Esperanto Taster Day**
Following initiative by Wedgwood Memorial College, EAB has arranged an Esperanto Taster Day with and at the college to take place on 20 November. This Development Course, for which the college has obtained outside funding, will be presented by Terry Page and will involve three hours of information and instruction all free of charge and including lunch. The number of participants is limited to ten, who must all be recruited locally. The college has advertised the event.

**• Parlez-vous européen?**
La 26–an de septembro aperis tutpaĝa anonco en la grava franca ĵurnalo *Le Monde* kun la titolo 'Parlez-vous européen?' [Ĉu vi parolas eŭrope?]. Oni komentis: 'Plaĉas ekzemple, ke ĝi rekte alfrontas la hegemoniecon de la angla ĉe Eŭropa Unio, kaj proponas Esperanton kiel solvon.' Laŭdire, la sama reklamo aperis ankaŭ en la ĵurnaloj pola *Rzeczpospolita*, litova *Lietuvos* kaj itala *Reppublica*.

**• Uninformed bacteria**
The Yakult company, producer of bacterial health products, has produced a booklet called 'Yakult and Bacteria Management – What? How? Why?' and distributed it via milkmen. In it appears the following: 'Dr Shirota invented Yakult, he wanted a name that would signal the universality of this little drink. In those days Esperanto looked like being the universal language, so it was a natural choice. Still if Esperanto didn't catch on (and we can forgive him one small mistake) the habit of drinking Yakult did.'

Clearly Dr Shirota knew little or nothing of Esperanto. Enlightening information can be sent to the company (www.yakult.co.uk): tel. 0845 769 7069 or Yakult Customer Information Services, 12–16 Telford Way, London W3 7XS.

**• Article in Preston press**
The *Evening Post* (Preston) published a substantial article on 7 May based on an interview with Paul Gubbins about Esperanto prior to his talk at the meeting of the North-West Esperanto Federation the following day.

**• La ĉiujara SATEB-Semajnfino**
okazos de la 13–a ĝis 15–a de majo 2005. La gastpreleganto estos Atilio Orellana Rojas, direktoro de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Li prelegos pri 'Amerikaj indiĝenoj: ekspluatado, genocido kaj forgeso' kaj 'Prezentado de Agado Espero' (kreita de UEA por subteni suferantojn de militoj kaj naturaj katastrofoj, kreado de lernejoj en evolulandoj kaj solidareca subteno al diversaj landoj).

**• Membership statistics**
The latest membership statistics show that EAB has 382 Full members, 80 Supporters, 31 Family members, 33 Life members, making a total of 526. There have been 27 new members over the last 12 months, while 24 have been deleted. This is broadly what was expected, i.e. the number of members has stabilised since the decline due to the move from London. The progress in education and publicity should now begin to bear fruit, provided the good work continues with the cooperation of all members. (Stats. from EAB office; comments by the editor.)

**• Chemically yours**
Mr E. Smith of Widnes informs that he gave a copy of *English–Esperanto Chemical Dictionary* by D.R. Duncan to his local chemical museum – Catalyst Science Discovery Centre (www.catalyst.org.uk) – who were pleased to receive it. ❑


Sciu pri la historio!

***LA DANĜERA LINGVO*** de Ulrich Lins

*Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*

**Klasika historia studo de la plej alta nivelo pri gravegaj okazaĵoj el la historio de la Internacia Lingvo – libro, kiun ĉiu esperantisto devus legi.**

Dua eldono, bele kaj fortike bindita. Moskvo: Eldonejo 'Progreso', 1990. 568 paĝoj. Formato 13,5 x 21cm. ISBN 5-01-003136-1. Prezo: €24,00.




*Mendu ĉe la Libroservo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Retpoŝte: libroservo@co.uea.org) aldonu 10 procentojn por la sendokostoj.*

**Let's discuss it by e-mail**

Dear Editor,

It was agreed at the AGM and mentioned in the last issue of *Update* that I would start two new e-mail services.

A. Restart *EAB-NetNews*. B. Start an e-mail discussion group, rather on the lines of the old 'Konsila Komisiono', which would discuss ideas, both old and new, to forward the use of Esperanto in Britain in general and expand EAB in particular.

Members in all categories were invited to send me their e-mail addresses. So far I have only received one or two requests to join these new services (which are free!). If the numbers increase to be in the twenties then I will start but otherwise the schemes are in abeyance. If you are interested please send me an e-mail right now. Ne prokrastu!

Eric Walker, tel. 01473 717088; e-mail: ericwalker@gn.apc.org

Eric Walker

**Correspondent requested**

Dear Sir,

We originate from Grimsby, Lincolnshire, and now live in Spain. I met Esperanto in the 1930s. We consider ourselves as thorough Europeans.

Some weeks ago someone mentioned Esperanto, and I figured what a wonderful way to cut down some of the language barriers that are impeding the progress of communication between some of the European countries.

I would like to put a ha'pennyworth of effort into helping to achieve just that.

If you have in your organisation a couple or one person who would not mind communicating with my wife and me on matters relating to Esperanto or Europe, we would appreciate it.

We visit the UK infrequently and until I get a computer, mail is the sensible way to communicate.

Incidentally, we are both in our early eighties.

Jim and Joyce Gibbins
Camping La Cabañuela
Camino Cortijo del Cura
ES-18812 Freila
Granada, Spain

**'Reporting error'**

Dear Editor,

The report on EAB's AGM 2004 in *Update* issue 26, p. 4 reported 'Bill Walker commented on the subject of debt...'. I did not make the statement attributed to me about trustees' and members' liabilities.

Vilĉjo Walker

## Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondamikoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas unu el la multaj servoj de UEA (Universala Esperanto-Asocio).
*Koresponda Servo Mondskala*, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio. www.multimania.com/kosomo
*Por pliaj informoj pri la servoj de UEA, akiru la Jarlibron de UEA.*

## Korespondemuloj

Mi deziras korespondi pri diversaj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn kun britaj esperantistoj. Per tio mi konas la mondon, ĉar mi ne plu vojaĝas. S-ro **Lluís Soldevila Mominó** (Camí la Torre - Xalet, ES-08610 Avià (El Berguedà), Hispanio. Mi estas 70-jara kaj el **Katalunio**.

20-jara studento el Madagaskaro deziras korespondi kun samaĝulo (inter 15–25-jara): **Mbelo Hery Ravoninjatovo**, Lot 1139 Bis 67 Ita Nord-Ouest, MG-101 Antananarivo, **Madagaskaro**.

## Calling all treasurers!

In recent months treasurers of some Esperanto groups have asked what to do when the group folds up, leaving cash in a building society or bank account. In some cases there is only one person left with this responsibility.

First, if the group has a constitution, read it and follow the instructions. This may mean calling a special meeting, with a specific number of members attending to make a quorum. Then you can pass a resolution to close the account and send the money to EAB – or elsewhere if permitted. In a small group a 'virtual' (e-mail) meeting might be allowed.

If not, and you are the only person left in the group, you may be able to close the account and send a cheque to EAB.

If the group has an account but the signatories have died, then you have a different problem. Please contact me for assistance.

Building societies and banks have tightened up rules but they aren't all the same. Please talk to yours and find out if you can close the account, or if not ask what's to be done. For instance, there is one for which you can draw out all but £1 without problems, but closing the account isn't so simple.

What to do with the cash: EAB holds several Funds into which the money could be paid: Education, Butler Library, Publicity, 'Afrika Agado', Esperanto Garden. All donations to these Funds are mentioned in the annual accounts.

If you prefer the money to go to one of the UEA Fondaĵoj, EAB can transfer the money once the cheque has cleared.

If your group has a substantial sum and you decide not to dedicate it in this way, EAB could hold it under your name for a period – say seven years – with written instructions to pay it back if the group is re-established. After that period, it would be incorporated into EAB's funds as a donation, to whichever of the funds you nominate, or general funds if not.

For further advice, contact me via the Esperanto Office (see p.2).

Joyce Bunting, Hon. Treasurer

# Por pli ol butikumado

*Jen raporto pri efika informa agado de nur unu malgranda Esperanto-societo – 'guto malgranda, konstante frapante ...'*

Esperanto-Rondo de Woodspring (WER) konsistas el Peter Bowyer, David Curtis, Dick Hinton, Joyce Hinton, Marie King, Jim Mathias kaj Maja Wellard. Kiam Jim Voiels, en la nomo de EAB, skribis al ĉiuj britaj Esperanto-grupoj en januaro, sugestante ke oni publikigu la centjaran datrevenon de la fondo de EAB, tuj agis WER, ĉar membroj, kunvenante semajne, jam ricevis ekzemplerojn de *Pontoj*.

*Ponto* estas jara revuo, enhavanta kontribuojn de Esperanto-kluboj en Hildesheim (Germanio) kaj ĝiaj ĝemelurboj: Weston-super-Mare (la hejmo de WER), Angouleme (Francio), Halle (Germanio), Gelendjik (Rusio), Rostov-Don (Rusio) kaj Pavia (Italio). Hans Fechler, de Hildesheim, ekredaktis la revuon en 1992, kaj grade la afero pliboniĝis pro belaj bildoj, ĝis nivelo tiom impresa, ke WER ceremonie montris ĝin al magistratano Roger Perks, la urbestro de Weston-super-Mare, kaj donis al li ekzempleron kun 80 paĝoj A4-ampleksaj.

**Pli longa intervjuo**
Li tiom interesiĝis pri Esperanto kaj la centjara datreveno de la nacia asocio, ke intervjuo planita por duonhoro etendiĝis ĝis horo. Tial WER informis pri la intervjuo la ĉefan lokan ĵurnalon, *Weston Mercury*, kaj raportisto Rory Harrington, kiu neniam aŭdis pri Esperanto, aranĝis viziti la venontan rondo-renkontiĝon kun fotisto. Tiam li multe demandis kaj multe skribis pri la lingvo mem kaj la historio de WER, kiu konsistas el nur sep personoj. Tri el ili, edzparo Dick kaj Joyce Hinton kune kun David Curtis, sidis sur tripersona sofo.

Kiam Joyce diris: 'Ni eklernis Esperanton en 1986, kaj tuj iris al Rusio por amikiĝi kun rusoj dum la Malvarma Milito ...', Rory notis tion sed eraris pri kies edzino estas Joyce, kiu sidis flanke de David. Li raportis: 'Joyce diris: "David kaj mi iris al Rusio ...".' Kiam lia artikolo aperis, konatoj de Joyce ŝerce diris al ŝi: 'Do! Vi sekrete iris al Rusio, ne kun Dick, sed kun David, ĉu?'

**Longa ĵurnala artikolo**
La artikolo estis tre longa, sub granda titolo, 'Vivu Esperanto!', sed ne menciis la urbestron, la datrevenon de EAB kaj apenaŭ la revuon, sed tiu lasta klare aperis en bonega foto pri la grupo ĉirkaŭ blanka tabulo, sur kiu estis skribita 'Woodspring Esperanto-Rondo'. La legantaro nombras pli ol sepdek mil, kaj la telefonnumero de David aperis en la lasta linio, sed nur geamikoj de la rondanoj entuziasmiĝis pri la artikolo, kaj iu telefonis, dirante ke li aŭdis, ke David estas spertulo pri lingvoj, kaj demandis, ĉu li povus instrui pri la hispana?

**Ankoraŭ duonpaĝa artikolo**
Tri monatojn poste Marie-France Conde-Rey, unu el la kontribuantoj al *Pontoj*, de Angouleme, gastis ĉe David, proponante prelegeti al WER pri la francaj kuirkutimoj. Pro tio, WER, akirinte iom da publico pro la artikolo en la ĉefa loka ĵurnalo, informis rivalan lokan ĵurnalon *Weston and Worle News* pri la nekutima vizitantino kaj ŝia temo. La redaktorino interesiĝis kaj sendis raportistinon, Lindsey Williams, kiu alvenis sen fotisto, sed intervjuis ĉiun. Same kiel Rory, Lindsey neniam aŭdis pri Esperanto, kaj ŝi skribis multon. Atenteme, ŝi aŭskultis parton de la prelegeto antaŭ ol foriri.

Semajnon poste fotisto vizitis la grupon, kaj baldaŭ aperis plua

## Celebrating recently?

Following distribution of three substantial mailings to Esperanto groups during the year, a number of the groups held EAB centenary events during September and October.

A news release about the centenary (24 September 2004) was distributed to national media contacts. Esperanto groups have been encouraged to contact their local media for their own individual events.

- Have you been celebrating EAB's centenary recently?
- Do you have pictures (captioned), press cuttings or a report from your centenary meeting? If possible, please send them to me so that we can use them for publicity purposes.
- Also, let me know if you want the material returned.

My address is: J. Voiels, 20 Norbury Close, Southport, Merseyside PR9 9YW. Tel. 01704 226776; e-mail: jim@voiels.fsnet.co.uk.

Jim Voiels, EAB Public Relations Officer

## Membership Membraro

**New Members**
Dr Doris Busenkell, London
Michael Carty, Cheltenham
Bill Coulthard, Eccles
Donald Dickinson, Penrith
J. Fraser-Armstrong, London
Andy Pepperdine, Bath
Brian Ranwell, Ilkeston
Joan Singleton, Ormskirk

**New Supporter**
Janis Morris, Louth

**Passed Advanced Exam both written and oral:**
Andreas Kück, Germany

**Passed Advanced Exam**
Brian Burns, Armagh

**Completed *Elementary...!* course**
Ross Weekes, Driffield

**Completed Free Postal Course**
Michael Carty, Cheltenham
Eleanor Dunphy, Berkhamsted
Sara Jennings, Hereford

**Died**
Margaret Fisher, Cheltenham
Sibyl Sly, Letchworth

bonega foto klare montranta ekzempleron de *Pontoj*. Kun la foto estis duonpaĝa artikolo, kies grandlitera titolo estis 'Bonvenon al Esperanto!'. Lindsey klarigis al miloj da legantoj la historion kaj naturon de Esperanto, sed ne menciis la datrevenon de EAB, nek eĉ la viziton kaj prelegeton de Marie-France, per kiuj WER unue interesis la redaktoron.

Miloj da homoj legis la artikolon, kaj unu el ili skribis longan leteron al la redaktoro, kiu aperigis ĝin en la sekva numero. La skribinto argumentis, ke kvankam la franca estas tre komplika, danke al lernejaj lecionoj britoj povas butikumi per la franca, sed per Esperanto neniu povas butikumi.

WER tuj respondis, ke laŭ EAB estas miliono da Esperanto-parolantoj en 130 landoj. Kun iu el tiuj Esperanto-parolantoj oni povas butikumi en lia aŭ ŝia lando tute kontentige, kaj inverse, WER jam gvidis Esperanto-vizitantojn de Francio, Germanio, Rusio, Bulgario, Nederlando kaj Japanio, butikumante tre sukcese. WER aldonis, ke iuj ajn povas lerni Esperanton interrete aŭ telefoninte al David. Iun tagon poste venis denove telefonita demando: Ĉu David, spertulo pri lingvoj, povus instrui pri la hispana?

La redaktoro de *Pontoj* gastis ĉe WER en julio, ne kiel esperantisto, sed kiel membro de la ĥoro de Hildesheim, vizitanta sian ĝemelurbon. WER prezentis lin kiel redaktoron de *Pontoj* al la nova urbestro Astra Brand, kiu volonte konsentis esti intervjuita de WER antaŭ ol la venonta numero de la revuo aperos.

**Kaj tria artikolo survojas**

Fine de julio surpriza mesaĝo, de sendependa ĵurnalisto Rob Campbell, lekciisto pri la ĵurnalismo ĉe Universitato de Glamorgan, aperis ĉe la WER-komputilo. Li opiniis, ke Esperanto estas tre interesa temo, speciale dum la centa jaro de la ekzisto de EAB, kaj li volas intervjui la rondanojn de WER iam en aŭgusto, celante aperigi artikolon en *Western Daily Press*, kies legantaro loĝas en vasta regiono, kiu inkluzivas ankaŭ Bristolon kaj grandajn urbojn en la sudokcidento de Britio. WER konsentis pri la 31-a de aŭgusto kaj demandis, ĉu ĉeestos fotisto.

Rob Campbell ja alvenis la 31-an de aŭgusto, sed sen fotisto. Li plene diskutis la temon Esperanto kun la rondanoj, aldone al kiuj ĉeestis Andy Pepperdine, de Bath, kiu rekomencis Esperanto-studadon post tridek-jara paŭzo. Rimarkinde estis, ke li ankoraŭ povis laŭtlegi kaj enangligi la lingvon, kiam la rondanoj okupis sin pri *Monato*-artikolo verkita de David Curtis, pri loka domego Tyntesfield. La ĵurnalisto pasigis pli ol horon intervuante ilin.

La 13-an de oktobro – por koincidi kun la centjara datreveno de la fondo de EAB – la artikolo de Rob Campbell, kun la antaŭa foto, kovris tutan paĝon de *Western Daily Press* (legantaro 125 mil). Ĝi estas la plej justa artikolo pri Esperanto iam legita de mi en britaj ĵurnaloj ekde kiam mi ekkribris ilin en 1974.

David Curtis

## *Londona Esperanto-Klubo havas novan sidejon*

Post multegaj jaroj ĉe Fred Tallant Hall, LEK devas translokiĝi. La 30-an de oktobro okazos Adiaŭa Festo ĉe Drummond Street. La nova kunvenejo estos Central YMCA, kies avantaĝoj tamen kredeble superas la ĝisnunan ejon. Ĝi situas nur kelkajn paŝojn de la metrostacio Tottenham Court Road, apud Oxford Street. La ejo krome provizas per naĝbaseno, gimnastikejo, artejo, manĝejo kaj pli, kio eventuale signifas, ke la membroj de la Londona Klubo estos la plej fizike sanaj en Britio!

Do ekde la 5-a de novembro la adreso de LEK estos: Central YMCA, 112 Great Russell Street, London WC1B 3NQ. Tel. 020 7343 1844. La sekretariino estas: Norah Brown, 17 Westbury Drive, Brentwood, Essex CM14 4JZ. Tel. 01277 218498; rete: norah.brown@virgin.net; www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/lek. ❑



## *Ekpaku!*

☆ **Plena listo de aranĝoj** konsulteblas ĉe: *www.esperanto.hu/kalendar.htm*, aŭ sendu iun ajn retmesaĝon al la aŭtomato: *kalendaro@esperanto.org*. Se vi deziras rigardi mapon de aranĝoj, iru al: *www.esperantoland.org*

22–24 oktobro 2004
**Course-You-Can – Beginners Esperanto**. Inf.: Wedgwood Memorial College, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG. Tel. 01782 372105; rete: wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

6–7 novembro
**Studsemajnfino** (pluraj nivelaj), Hoek van Holland, Nederlando. Inf.: Jeannette Bosse, Veldm. Montgomerylaan 361, NL-5612 BH Eindhoven, Nederlando. Tel. +41-(0)40-2113344. Rete: hj.bosse@wxs.nl

12–14 novembro
**Konferenco pri Scienca Aplikado** de Esperanto, KAEST-2004 en Dobřichovice (ĉ. 20km apud Prago. Inf.: Kava-Pech, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio. Tel.: +420-257-712201; fakso: +420-257-712126. Rete: info@kava-pech.cz

13–15 novembro
**10-a Kolombia Kongreso de Esperanto**, Popajano, Kolombio. Inf.: Rafael A. Mejía O., Kolombia Esperanto-Ligo, Calle 18A No. 55-96 Apto 111-C, Cañaverales V, Cali (Valle), Kolombio. Rete: rafaelmejia48@hotmail.com

20 novembro
**6-a Festivalo de Esperantaj Filmoj**, Bratislavo, Slovakio. Inf.: Nataša Šándorová. Tel: +421-(0)905-138769

29 novembro–5 decembro
**Lernu Esperanton en Ĉeĥio** kun francaj fervojistoj (kun turisma programo). Inf.: Petro Chrdle, CZ-25229 Anglická 878, Dobřichovice, Ĉeĥio. Rete: Petro Hrdle

4–11 decembro
**8-a Meksika Kongreso** de Esperanto, Akapulko. S-ro Luis I Raudón Uribe, Andres Sufrend 19, Col. Costa Azul, Acapulco, Gro., Meksiko. Rete: lraudon@yoli.com.mx.

10–11 decembro
**Antaŭ-Kristnaskaj Vesperoj**, Bratislavo. Inf.: Alica Komlóšiová, Rovníková 6, SK-821 02 Bratislava, Slovakio. Tel. (02) 43 29 16 04.

10–12 decembro
**22-a Studadsesio en Herzberg am Harz**. Inf.: Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 8, Germanio. Tel/fakso: +49-(0)5521-1363, +49-(0)5521-71123, rete: zilvar@t-online.de

11 decembro
**Ĉeĥa-Saksa Tago**, Ústí nad Labem, Ĉeĥio. Inf.: Miroslav Smyčka, Kojetická 90, CZ-40003 Ústí Nad Labem. Tel: +420-721851502, rete: j_kriz@volny.cz/m.smyczka@seznam.cz

25–26 decembro
**27-a Jara Kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio**, Multan. Inf.: PEA, Esperanto Markaz, Chowk Shahidan, Multan, Pakistano. Rete: Jawaid Eahsan: saluton123@yahoo.com

27 decembro–2 januaro **2005**
**Ago-semajno en Zakopane**, Pollando. Inf.: Irek Bobrzak, Toruńska 82/133 Tel. +48-508-779 097, rete: viavento@poczta.onet.pl

27 decembro–3 januaro
**21-a Internacia Festivalo** (aranĝo por familioj kaj personoj 25–55 jaraĝaj) en Magdeburg, Germanio. Kadra temo: 'Tradicioj'. Inf.: Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein. Tel/fakso: +49-5624-8007, poŝa +49-171-4964558. Rete: HDP@internacia-festivalo.de

27 decembro–3 januaro
**48-a Internacia Seminario** (IS), Wetzlar, Germanio. Inf.: Harald Fischer, Gustav-Adolf-str. 2, DE-Nordwalde. Tel/fakso: +49-2573-626. Rete: is.admin@esperanto.de

27 decembro–3 januaro
**3-a Novjara Renkontiĝo** por festi la Novan Jaron en kastelo Marienburg ĉe Mozelo (inter Koblenz kaj Trier). Inf.: EsperantoLand e.V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, DE-10551 Berlin, Germanio. Tel. +49-30-6855831. Rete: Lu@EsperantoLand.org

4–12 januaro 2005
**1-a Internacia Vintrosporta Semajno**, Mezmontaro Harz (Germanio): skiado, vintromigrado, glaciart-kurseto, saŭnumado, naĝado. Inf.: Germana Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg/Harz. Tel. +49-(0)5521-5983; rete: esperanto-zentrum@web.de

21–23 januaro
**Ni Festivalu!** Teatrumado kun Paul Gubbins. Inf.: Wedgwood Memorial College (vidu la antaŭan paĝon).

Februaro
**Februara Skiado**, Bulgario. Inf.: Lasto Nikov, BG-1000 Sofio, P.K.497, Bulgario. Tel. +359-2-9835084, +359-2-318840; rete: lasto@mail.bg / lasto11@yahoo.co.uk

4–6 februaro
**23-a Studsesio en Herzberg Harz** (Klerigado por estontaj Esperanto-instruistoj kaj fakuloj de GEA) kun fakprelegoj. Inf.: (vidu supre).

4–8 marto
**4-a Azia Kongreso**, Nepalo. Inf.: S-ro Bharat Ghimire, PO Box 180, Kathmandu aŭ 4-a AK de Esperanto (ĉe NEspA), GPO Box 8974 CPC 102, Katmandu. Tel: +977-1-4410524 (11:00-17:00 lun.–ven.). Rete: esperanto@wlink.com.np

21–28 marto
**21-a Printempa Semajno Internacia**, Mücke (Meza Heslando). Inf.: Germana Esperanto-Asocio, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, DE-52474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio. Tel. +49-(0)2641-4885, fakso: +49-(0)9786-66 (oficejo). Rete: psi@esperanto.de

23–29 marto
**29-a Internacia Junulara Festivalo** (IJF). Inf.: Itala Esperanto-Junularo, Via Villoresi, 38, IT-20143 Milano, Italio. Tel/fakso: +39- 02-58-100857, rete: ijf.admin @esperanto.it

25–28 marto
**23-a Studadsesio en Herzberg am Harz**, Germanio. Inf.: (vidu supre).

25–30 marto
**Bulonjo 2005**: Memorfesto celebre de la centjariĝo de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Maro, Francio. Inf.: boulogne 2005@online.fr

29 aprilo–1 majo
**Biblia Sabat-Dimanĉo** (diservoj, kantoj, bibliaj tekstoj), Kapuziner-Begegnungshaus St. Fidelis, Zell am Harmersbach, Kinzigtal (Sud-Germanio). Inf.: rete: Bernhard. Eichkorn@esperanto.de

30 aprilo–09 majo
**Aroma Jalto–Esperanta Festivalo**. Inf.: Vladimir Hordijenko, P.k.35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. Tel. (044) 2951701. Rete: volodimir_h@ukr.net

5–8 majo
**82-a Germana Esperanto-Kongreso**, Bad König (Odenwald). Inf.: GEA, Immentahlstr. 3, DE-79104 Freiburg, Germanio. Tel. +49-761-289299; rete: esperanto-zentrum@web.de

13–15 majo
**SATEB**, Barlaston. Inf.: Wedgwood Memorial College (vidu supre).

13–16 majo
**25-a Studadsesio de Germana Esperanto-Centro**, Herzberg am Harz (Oficiala klerigado de GEA), fakprelegoj de docentoj, klerigado por Esperanto-fakuloj kaj estontaj kursestroj kaj instruistoj, favorprezaj tranokteblecoj por eksterlandanoj kaj gejunuloj. Inf.: Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 8, Germanio. Tel/fakso: +49-(0)5521-1363, +49-(0)5521-71123, rete: esperanto-zentrum@web.de

10–13 junio
**53-a Kongreso de ELNA**, Austin, Teksaso, Usono. Inf.: Philipp Dorcas; rete: filipo@grupoj.org

10–13 junio
**100-a Skota Kongreso de Esperanto**, Largs, Skotlando. Inf.: Esperanto-Asocio de Skotlando, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP. Tel. 01698 263199; rete: secretary@skotlando.org

23–30 julio
**90-a Universala Kongreso de Esperanto**, Vilno, Litovio. Inf.: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. 00-31 10 436 1044; rete: uea@inter.nl.net; www.uea.org.

6–12 aŭgusto
**44-a Esperanto-Somerlernejo**, Barlaston, Anglio. Inf.: Wedgwood Memorial College (vidu supre).

31 julio–7 aŭgusto
**61-a Internacia Junulara Kongreso**, Zakopane, Pollando. Inf.: 61-a IJK, Ireneusz Bobrzak, ul. Toruńska 82 m 133, PL-03226 Warszawa, Pollando.

29 julio–5 aŭgusto
**91-a Universala Kongreso de Esperanto**, UK 2006, Florenco, Italio. Inf.: Universala Esperanto-Asocio (vidu supre). ❑